**N I A  V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2006**

**NEKROLOGO**

La skoto **William Auld**, unu el la plej eminentaj verkistoj kaj poetoj de Esperanto, plurfoje proponita por la Nobel-premio ekde 1999, forpasis la 11an de septembro 2006. En 1952 kun aliaj tri poetoj de Skotlando li verkis "Kvaropo", la unua publikaĵo de la eldonejo "Stafeto" de Juan Régulo Pérez. Li verkis en Esperanto la libron kiun Marcos Cruz tradukis al la hispana kaj eldonis Madrida Esperanto-Liceo: "Esperanto: fenómeno de la comunicación". Li estis kelkajn fojojn en Madrido invitita de geedzoj Fighiera kaj li partoprenis aktive en la Hispana Kongreso de Madrido okaze de la Centjariĝo de Esperanto en 1980, li prelegis, kaj gvidis kolokvon pri "La lingvoj de Iberio". Lia lasta verko estis la traduko de la libro de Tolkien "La sinjoro de la ringoj". Li estis vicprezidanto de UEA, prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj de la Klubo PEN de literaturo en Esperanto.
Ampleksa prezento de li aperas esperantlingve ĉe : http://eo.wikipedia.org/wiki/William_AULD
La novaĵo aperis en la ĵurnaloj: El Mundo, La Razón.

**65-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO El Puig (Valencia)**

Aliĝis 61 kongresanoj el 7 landoj. Oni inaŭguris du interesajn ekspoziciojn: e-poŝtmarkoj de Rafael Peris kaj fotoj de pola esperantistino Aneta Bedkowska pri Irano.
**Prelegoj**: Dum la Solena Malfermo, post la salutvortoj de la Urbestro de El Puig, sekvis festparolado de Rafaela Urueña. Alejandro Pareja parolis pri "George Orwell kaj ties rilatoj kun Lanti kaj Esperanto". Jesuo de las Heras montris sian retan "Gazetoteko Lanti". La filologo Pau Mendoza pri la temo "Lingvaj normoj ĉe Esperanto", demonstracio de Darío Rodríguez pri Esperanto en Interreto.
**Distra programo**: projekciado de du filmoj de Roman Dobrzynski en Esperanto, pri la UK en Pekino kaj pri Rio de Janeiro. Demonstracio pri "Ventrodanco", far la germana esperantistino Beate Schneider, profesorino pri tiu malfacilega danco-arto. Sonia kantis "a capella" belegan kanzonon "Dankon al la Vivo" kaj Luc prezentis recitalon de pluraj kanzonoj en Esperanto, kun gitara akompano far li mem. Violin-koncerto de la valencia violinisto Raúl Arias López.
**Vizitoj kaj ekskurso**: monaĥejo de El Puig, kavernoj de La Vall d'Uixó, Sagunto, Valencio, fabrikejo Lladró.
**Prezentado de libroj**: "Vivo de Zamenhof", de Marjorie Boulton, eldonita far la Urbestraro de Cheste, kaj "El hombre que desafió a Babel", de René Centassi kaj Henri Masson, eldonita de Madrida Esperanto-Liceo.
**Ĝenerala Asembleo**: la plej konsterniga temo estis la demisio de la redaktoro de "Boletín", Manuel Pancorbo, kiu ne povas daŭrigi pro privataj aferoj. Evidentiĝis, do, grava krizo: nur aperis du numeroj de Boletín ĉijare kaj eble nur povos aperi la tria. La juna samideano Jorge Pavón sindoneme sin oferis por la redaktora posteno. La Asembleo decidis esprimi sian gratulon al Toño del Barrio pro lia agado okaze de la 5a Centjariĝo de Don Kiĥoto, kiu, interalie, atingis gravan subvencion por HEF.
**Diversaj**: Augusto gvidis kurson por progresintoj kaj amuzan kvizon. La Libroservo de SATEH estis prizorgita far Pedro Sanz. Sub la gvido de Pedro Garrote okazis diskutado pri la agado sekvenda por havigi pli da membroj al HEF.
**Gastronomio**: "paella" kuirita far la veteranaj esperantistoj el Castellón Inés Comabella kaj Francisco Conejero. Ankaŭ okazis demonstracio pri preparado de "sangría" kaj precipe de la bongusta "Akvo de Valencio", koktelo de ĉampano, oranĝa suko kaj vodko plus eroj da oranĝa frukto (Resumo de la informo de Darío Rodríguez)

**ESPERANTAJ VOLONTULOJ DUM LA VIZITO DE LA PAPO BENEDIKTO 16-A AL VALENCIO**

Julie dum la vizito de la Papo al Valencio, inter la 8.000 volontuloj troviĝis la esperantistoj Ania Karmowska (polino kiu troviĝis en Valencio pere de stipendio Erasmus) kaj Augusto Casquero. Ilia tasko estis deĵori en informbudo, por informi kaj helpi la pilgrimantojn (ĉirkaŭ miliono kaj duono). Ili estis elektitaj por tiu tasko pro ilia lingvokono. Kvankam en la informbudo oni anoncis la eblecon demandi en Esperanto neniu demandis en tiu lingvo, sed multaj demandis "pri" Esperanto. Ili ricevis informojn pri kursoj, retadresoj, e-grupoj, ktp.

**AMASMEDIOJ**

D-ro. Ismael Ejarque Doménech verkis artikolon pri Esperanto aperinta en julio en la ĵurnalo "Diario Médico".

La revuo de la sindikato CNT (agosto-septiembre 2006) publikigas artikolon de Antonio Marco Botella "Esperantistas y libertarios". Ĝi komplementas la parton kiu rilatas al Hispanio de alia artikolo titolita "Esperanto y anarquismo" eldonita en la sama revuo.

La "Instituto Galego de Análise e Documentación Internacional" (IGADI) havas nun prezenton en Esperanto. Ĝi troviĝas en http://www.igadi.org/html/t_que_esperanto.htm

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) au kontakti rete: admin@esperanto.es

Post la demisio de Manolo Pancorbo, "Boletín" havas novan redaktoron, temas pri Jorge Pavón, junulo kiu loĝas en El Escorial. Li tre dankos vian kontribuon (novaĵojn, artikolojn, fotografaĵojn, ktp.) je la adreso: bulteno@esperanto.es . La venonta numero aperos en oktobro.

La datumbazo de la Biblioteko jam estas preta en Access por inkludi en la paĝaro de HEF.

**AUGUSTO AGADAS**

Augusto Casquero, HEF-Prezidanto, estis en Komarno (Slovakio) por ĉeesti la ekzamenojn de AIS-San Marino kiel membro de la ekzamen-komisiono. Ĝis la fino de la jaro li restos en Pollando por instrui en Esperanto.

**JUNA E-GERMANINO EN MADRIDO**

Anja Kruse, 19-jara ino de la proksimeco de Bremen, Germanio, vojaĝis al Madrido por lerni la hispanan kaj labori kiel Au Pair en hispana familio. Ŝi loĝas en Boadilla del Monte por 10 monatoj. Ŝi ŝategus konatiĝi kun afablaj gejunuloj kiuj helpos ŝin iĝi "una madrileña" :
kruse.anja@googlemail.com

**FILMO "Gerda Malaperis"**

Bazita sur la konata libro de Claude Piron, la filmo estas bonega kaj profesia, spektenda, kaj bonega materialo por lerni nian lingvon, ĉar oni povas sekvi la konversaciojn legante subtitolojn en alia lingvo (ekzemple la hispana). Petoj al Pedro Hernández: informo@esperanto.es

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ekde la 18-an de septembro niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

CURSO DE ESPERANTO EN VALLECAS
Librería Muga, Avda. Pablo Neruda, 89
Tel. 91 507 90 84/85
667 721 951

Clases gratuitas los sábados a las 17,00 (curso básico)
y a las 18,30 (nivel medio).
Comienzo de las clases: 7 de octubre de 2006

Hay un grupo Yahoo donde se pueden conseguir los materiales del curso.
Para apuntarse al grupo enviar un mensaje en blanco a
esperantovallekas-subscribe@yahoogroups.com

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid